KANDIDATIĜO AL LA ADMINISTRA KOMITATO DE GREZIJONO

Elisabeth Barbay

Mi ekkonis la Esperanto-Kulturdomon en Pasko 1997. Tiam, ankoraŭ novbakita E-istino, mi venis kun 6 infanoj (inter kiuj ambaŭ miaj) por internacia infan-staĝo organizita de Paulette Naulet. Mi jam konvinkiĝis ke necesas renkontigi la diverslandajn lernantojn por ke ili spertu la internacian etoson kaj la efikecon de la lingvo.

Ĝis nun, mi ĉiujare klopodis organizi vojaĝon por miaj junaj lernantoj, privilegiante la kastelon Grésillon ĉiam kiam eblis. En majo 2005, kunlabore kun Gérard F., Francine B. et Jeanik M. ni « inventis » la novstilan infan-semajnon FRINGOJ, kiu okazis sinsekve en 2006, 2007 kaj 2008 kun kreskanta intereso flanke de la alilandaj kurs-gvidantoj : krom Francoj, partoprenis homoj el Litovio, Hispaanio, Ĉeĥa respubliko, Portugalio, Rumanio, Hungario kaj Pollando. Ankaŭ en 2009, 6 eksterlandaj grupoj jam pretiĝis kiam la « krizo » intervenis…

Post 2 malfavoraj jaroj, Gérard Fillion kaj mi bezonas restarigi fortan organizan teamon, surloke kaj en la pariza regiono. Tie, aparte urĝas retrovi strukturon, kie la eksterlandaj grupetoj povos tranokti malmultekoste, antaŭ kaj post la aranĝo. En Bondy, havas sian sidejon la asocio Bondy-Esperanto, kies prezidanto estas mi. Ĝis nun, la municipo volonte disponigis al ni buson kun ŝoforo por al- kaj re-veturi Grezijonen. Ankaŭ festo-salono kun eta scenejo principe disponeblas por la « reveno de la FRINGOJ » (spektakleto antaŭ la gepatroj, fotisto, reprezentanto de la urbestraro…).

La Festa Renkonto INternacia de GeknabOJ (FRINGOJ), kun sia fina spektaklo malfarmata al ne-E-ista publiko, povus iĝi bela montro-fenestro por la E°-Kulturdomo, surloke kaj eksterlande. Sed ankaŭ aliaj kulturaj eventoj povus allogi esperantistan kaj surlokan publikon. Tiucele, mi proponas ke, per nekostaj rimedoj (kaj mi mem pretas mon-helpi al tio), ni iom post iom, renovigu kaj transformu la Zamenhof-salonon al taŭga plurcela ejo, kun lumoj, sonsistemo kaj scenejo, tiel ke artistoj kaj asocioj (ne nepre esperantistaj) ekŝatos uzi ĝin. Luata por spektakloj, seminarioj, debatoj…, tia ĉambro alportus al la kastelo, iom da famo kaj parton de la mono necesa al ĝia prizorgado.

Elisabeth Barbay

Miaj konkretaj proponoj por kontribui al la vivo de Grezijono :

Teame, **organizi ĉiujare la infan-semajnon FRINGOJ**, viv-ĉerpujo por la estonta esperantistaro, montro-fenestro por E° kaj por la Kulturdomo (en la regiono kaj en Esperantujo), dank'al la **fina spektaklo malfermata al ekstera publiko.**

Per nekostaj rimedoj, kaj mi pretas praktike helpi al tio, ankaŭ mone, **transformi la Zamenhof-salonon al taŭga plurcela ejo**, kun lumoj, sonsistemo, scenejo, tiel ke artistoj kaj asocioj (ne nepre esperantistaj) ekŝatos uzi ĝin. **Luota kune-kun servo de teknika responsulo,** por spektakloj, film-spektadoj, prelegoj…, tia ĉambro alportus al la kastelo parton de la mono necesa al ĝia prizorgado.

Mi deziras harmonie kunlabori kun ĉiuj bonvolemuloj interesataj de miaj proponoj.

CANDIDATURE AU C.A. DE GRÉSILLON

Elisabeth Barbay

J'ai découvert la MCE à pâques 1997. Encore débutante à l'époque, j'y avais amené 6 enfants (dont les 2 miens) afin de participer à un stage international d'enfants organisé par Paulette Naulet. J'étais déjà convaincue de la nécessité des rencontres entre élèves de différents pays afin qu'ils fassent l'expérience de l'ambiance internationale et de l'efficacité de la langue.

Jusqu'à maintenant, je me suis arrangée pour organiser chaque année un voyage pour mes jeunes élèves, privilégiant autant que possible le château de Grésillon. En mai 2005, avec Gérard F., Francine B. et Jeanik M., nous avons « inventé » FRINGOJ, une semaine des enfants d'un nouveau genre, qui a eu lieu successivement en 2006, 2007 et 2008 avec un intérêt croissant de la part des enseignants étrangers : outre des Français, sont venus des participants de Lituanie, Espagne, République Tchèque, Portugal, Roumanie, Hongrie et Pologne. En 2009, 6 groupes étrangers s'apprêtaient également à venir quand la « crise » s'est déclarée.

Après deux années « sans », Gérard Fillion et moi avons besoin de reconstituer une solide équipe organisatrice, sur place et en région parisienne où il est urgent, en particulier, de trouver une nouvelle structure permettant d'héberger à bas prix les groupes étrangers, avant et après la rencontre. L'association Bondy-Espéranto, dont je suis présidente, a son siège à Bondy (93). Jusqu'à maintenant, la municipalité a bien voulu mettre à notre disposition un car avec chauffeur pour les trajets aller et retour à Grésillon. De même, une salle pour 100 personnes avec une petite scène est en principe disponible pour le « retour des fringoj » (retour des pinsons), avec extraits du spectacle devant les parents, photographe, représentant de la mairie…

La Festa Renkonto INternacia de GeknabOJ (FRINGOJ) avec son spectacle final ouvert au public non-espérantiste, pourrait devenir une belle vitrine pour la Maison Culturelle de l'Espéranto, sur place et à l'étranger. Mais d'autres évènements culturels pourront également attirer le public, espérantiste ou local. Je propose que, à peu de frais (et je suis prête à aider financièrement ce projet), on rénove et transforme progressivement le salon Zamenhof en une petite salle polyvalente et fonctionnelle, avec lumières, système de sonorisation convenable et scène, afin que des artistes et associations (pas seulement espérantistes) aient plaisir à l'utiliser. La location d'un tel lieu apporterait au château une certaine renommée ainsi qu'une partie de l'argent nécessaire à son entretien.

Elisabeth Barbay

Mes propositions concrètes pour contribuer à la vie de Grésillon :

En équipe, **organiser chaque année la semaine des enfants FRINGOJ**, vivier pour la future génération d'espérantistes, vitrine pour l'espéranto et pour la MCE (dans la région et en Espérantie), grâce au **spectacle final ouvert au public extérieur**.

Avec des moyens modestes, et je suis prête à y aider, y compris financièrement, **transformer le salon Zamenhof en salle polyvalente fonctionnelle,** avec lumières, système de sonorisation convenable et scène, afin que des artistes et associations (pas seulement espérantistes) aient plaisir à l'utiliser. **Louée avec les services d'un responsable technique**, pour spectacles, projection de films, conférences…, une telle salle apporterait au château une partie de l'argent nécessaire à son entretien.

Je souhaite collaborer harmonieusement avec toute personne de bonne volonté intéressée par mes propositions.